Nikola Rašić

Kongresoj: vojo al kresko?

Enketa esploro pri Universalaj Kongresoj

Resumo

En 2002 estis farita statistika esploro pri diversaj aspektoj de la Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK). La artikolo koncize prezentas la ĉefajn eltrovojn de tiu esploro. La rezultoj donas ankaŭ plurajn ĝeneralajn informojn pri esperantistoj kiel socia grupo, sed ili rilatas precipe al opinioj pri kongresaj servoj, la rolo de UK kaj ĝiaj bazaj celoj kadre de la movado. La rezultoj montras ke la UK realisme spegulas la staton de la movado kaj bazajn sociajn ecojn de la Esperanto-komunumo. La komunumaj aspektoj ŝajnas pli pezi ol la movadaj, kio siaflanke starigas demandojn pri la estonteco de la movado kaj komunumo. Ju pli maleblos la atingo de proklamitaj celoj de la movado, des pli gravos la internen orientitaj evoluoj. Fine mi sugestas ke ebla solvo por estonta strategio de agado estus klara distingo inter la tri aspektoj: lingvo, movado kaj komunumo.

0 Enkonduko

0.1 La celo de la enketo

Maloftas enketaj statistikaj esploroj inter esperantistoj, precipe inter la UEA-membroj kaj regulaj vizitantoj de Universalaj Kongresoj. Tial ĉiu informo bonvenas, eĉ se ĝi ne estas tute aktuala. Tie ĉi temas pri enketa esploro farita en 2002[1]. Ĝia celo estis modesta kaj praktika: la Estraro de UEA volis ekscii kiel la kongresanoj spertas kaj taksas la Universalajn Kongresojn. Kompreneble, oni profitis la okazon ankaŭ por kolekti aliajn informojn pri la esperantistoj. Ĉi-loke ni koncize prezentas la rezultojn de tiu esploro. Pli detala ellaboro eble aperos poste.

0.1 La kongreso

Por la Esperanto-movado la Universalaj Kongresoj gravas pro diversaj kialoj. Temas pri unika okazo aktive – parole, rekte kaj tute persone – apliki la lingvon uzatan ĝenerale pli pasive ol parole. UK estas la plej grava parola manifestacio de la lingvo mem. Dum la UK la lingvo vivas kaj funkcias plenpulme, en ĉiuj siaj varioj kaj stiloj[2].

Krome, temas pri la plej grava konkreta manifestiĝo de la Esperanto-kulturo. Kulturo en la strikta senco de la vorto – oni muzikas, teatras kaj literaturas en la lingvo: Universala Kongreso estas la festivalo de tiu kulturo kaj ties plej alta punkto dum la jaro. UK estas la loko kie la esperantistaro ekzistas ne nur kiel virtuala kaj idea komunumo sed kiel kolektivo de konkretaj homoj interagantaj per sia lingvo kaj pro la lingvo. La kongreso ebligas al ni sperti kaj esplori tiun konkretan socian grupon, ekscii ion pri ĝiaj aspiroj kaj ĝia ĉiutaga vivo; pri ĝiaj valoroj kaj ĝiaj sintenoj je la lingvo kaj la movado sed ankaŭ je la mondo

[1] La esplorplanon kreis kaj efektivigis mi mem. La statistikan prilaboron kaj tabelojn faris Danijela Drakula, profesia psikologo, nun postenanta en Osijek, Kroatio. En 2003 ŝi finstudis psikologion ĉe la Filozofia Fakultato de la Universitato en Zagrebo per tre interesa diplomlaboraĵo pri socipsikologia temo ligita al la Esperanto-movado (Drakula 2003). Ĉi-okaze mi tre dankas Danijelan por ŝia laboro brile kaj zorge farita, samkiel pro atenta legado kaj komentado de tiu ĉi teksto. Ŝiajn komentojn mi principe akceptis, precipe se temis pri metodologio kaj interpreto de la rezultoj. Se restas svagaĵoj kaj malklaraĵoj, pri ili kulpas mi mem.

[2] Vidu la paroladon de Humphrey Tonkin, "La Universalaj Kongresoj kaj la kreo de Esperanto-komunumo: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ", faritan en la 90-a UK en Vilno (2005), http://uhaweb.hartford.edu/tonkin/pdfs/VilnoKongresaTemo.pdf. – *Red.*

ekstermovada. Tial esploroj pri Universalaj Kongresoj de Esperanto transiras la temon de kongreso.

Kaj ne laste: la UK estas la loko kie oni povas ekscii *kion la membroj de la kolektivo pensas pri la kongreso mem*: kiel ĝi estas organizita, ĉu ĝi respondas al la bezonoj de la komunumo: ĉu necesas ŝanĝi aŭ adapti ĝin aŭ ĝiajn erojn kaj se jes kiel? Tio estis la celo de nia enketo. La fona ideo estis apliki la rezultojn por eventualaj organizaj ŝanĝoj en la strukturo de UK-oj.

0.2 La samplo kaj la populacio

La enketo estis sendita al ĉiuj individuaj membroj de UEA en 2002 kiuj foje partoprenis iun UK. Krome ĝi estis sendita ankaŭ al kongresanoj-nemembroj partoprenintaj la UK en Fortalezo, Brazilo. Entute revenis 482 plenigitaj enketiloj – sufiĉe bona proporcio kiu permesas fari konkludojn pri eventuale ekzistantaj ĝeneralaj tendencoj en la populacio kiel tuto. La populacio estas ĉi tie difinita kiel "esperantistoj (membroj de UEA aŭ partoprenintoj de la lasta UK senkonsidere ĉu membroj) kiuj havas rektan personan konon pri UK-oj". La asertoj kaj ĝeneraligoj ĉi-artikolaj do rilatas unuavice al *esperantistoj-kongresanoj* kaj ne al ĉiuj esperantistoj. Ni ne konfuzu tion kun "averaĝaj" esperantistoj. Kio estas averaĝa ni ne povas scii malhavante la ĝeneralan difinon de la tuta populacio.

Por pravigi ĝeneraligojn por la tuta populacio de esperantistoj ni devus unue konkrete difini tiun populacion, do havi kriteriojn de esperantisteco kaj scii la dimensiojn de la grupo, spacajn, kvantajn kaj kvalitajn. Tio estas nesimpla tasko, kvankam ja interesa kaj iam farinda.

Ni kredas ke la informoj de tiu ĉi enketo havas apartan valoron por ekkoni tre gravan parton de la esperantistaro, se konsideri ke diversaj esploroj jam montris ke regula kongresa partopreno rekte rilatas kun aktiva "movadumado" kaj forta subteno al la idealoj kaj celoj de la movado (kp. Forster 1982). Per tiu ĉi enketado ni do ricevas informojn pri tre grava grupo de esperantistoj.

0.3 La resendoj

La plej multaj respondoj venis el Francio (13,5%), Germanio (10,6%), Brazilo (10,4%), Nederlando (7,6%), Britio (5,5%), Japanio (5,1%), Svedio (3,4%), Belgio (2,5%), Usono (2,5%), Kanado (2,1%) kaj Svislando (2,1%). Resendoj el tiuj landoj formas 65,30% el ĉiuj respondoj.

Tabelo 1: Enketitoj laŭ la loĝregionoj

Loĝlando	**n**	**%**	En la dua grupo troviĝas Danio, Rusio, Aŭstralio, Pollando, Ĉeĥio, Tanzanio, Hispanio, Bulgario, Hungario, Irlando, Israelo, Jugoslavio (tiam Serbio kaj Montenegro), Ukrainio kaj Kubo kun po 1,0% ĝis 1,7% : kune 18,80% aŭ ĉ. 84% prenitaj kune kun la unua grupo. En la tria grupo (ĉ. 10% el ĉiuj resendoj) estas landoj kiel Kroatio, Slovakio, Aŭstrio, Ĉinio, Estonio, Albanio, Kostariko, Meksiko, Nov-Zelando, Portugalio, Sud-Afriko kaj 18 aliaj landoj kun po malpli ol 1%-a partopreno en la samplo. (*1%=5 respondintoj*)
Okcidenta Eŭropo, Usono, Aŭstralio	283	58,7	
Orienta Eŭropo	60	12,4	
Latinameriko	61	12,7	
Azio	37	7,7	
Afriko	15	3,1	
nekonata, neindikita	26	5,4	
Entute	**482**	**100**	

Oni notu ke temas plejparte pri landoj de t.n. okcidenta kulturo. Tamen la bildo ne estas tute eŭropa: Brazilo kaj Japanio, Kanado kaj Usono kune donas 21% de ĉiuj respondoj aŭ 32% de la grupo de evoluintaj "okcidenteskaj" landoj.

1 La rezultoj

1.1 Demografiaj variabloj: sekso, aĝo, eduknivelo, familia stato kaj klasa aparteno

Tri kvaronoj de la respondoj venis de viroj. Tian proporcion havis ankaŭ pluraj aliaj enketaj respondoj (vd. Rašić 1994). La granda plimulto de la enketitoj aĝis pli ol 50 jarojn (2/3 el ĉiuj enketitoj) kaj pli ol duono havis eĉ 60 aŭ pli da jaroj dum la enketo. Malpli ol 10% oni povus konsideri vere junaj (malpli ol 35 jarojn) kaj apenaŭ 2% estas pli junaj ol 25 jarojn. Jen, denove konfirmiĝas la generacia problemo en la movado, kiu ŝajne senhalte oldiĝas. Rilate la eduknivelon konfirmiĝas la fakto trovita ankaŭ en aliaj esploroj, ke granda parto de la esperantistoj (2/3 el niaj enketitoj) estas alte edukita (universitato aŭ altlernejo).

Ĉirkaŭ unu triono vivas sola, dum du trionoj vivas kun partneroj. Tiu ĉi kategorio estas tro ĝenerala por esti komentita kaj komparita kun averaĝoj en diversaj landoj. Ni ne konas la kaŭzojn de soleco (ekz. vidveco, divorco, ĵus rompita rilato, malemo eniri rilaton, religiaj, etikaj aŭ aliaj konsideroj k.s.). Tiuj averaĝoj povas ege varii laŭ la landoj kaj kulturoj, same kiel la formoj de partnereco kaj kunvivado. Aliaj esploroj foje montris relative altan procentaĵon de soluloj, precipe inter virinoj. Du trionoj havis infanojn.

Rilate la ekonomian situacion la granda plimulto apartenas, laŭ la propra takso, al la meza klaso (bonstata aŭ mezklasa), kiel ajn vaste kaj relative oni komprenu tiujn ĉiu kategoriojn. Temas pri propra takso, farita plej probable surbaze de la kutimaj kriterioj en la loĝlandoj de la enketitoj. Tamen preskaŭ kvinono de la enketitoj taksas sian ekonomian pozicion kiel malfortan. Apenaŭ tri procentoj konsideras sin bonstataj. Riĉuloj do malabundas en la Esperanto-movado. Apenaŭ necesas denove substreki ke la Esperanto-movado estas afero de la meza klaso kun ĉiuj implicoj de tiu aserto.

Tabelo 2: Enketitoj laŭ demografiaj *variabloj* (N = 482)

Variablo		N	%
sekso	virinoj	124	25,7
	viroj	351	72,8
	nekonata	7	1,5
aĝo	ĝis 25-jara	9	1,9
	26- ĝis 40-jara	46	9,5
	41- ĝis 50-jara	67	13,9
	51- ĝis 60-jara	103	21,4
	pli ol 60-jara	256	53,1
	nekonata	1	0,2
formala eduko	elementa	22	4,6
	meza	130	27,0
	universitata	327	67,8
	nekonata	3	0,6
familia situacio	sola	164	34,0
	kun partnero	314	65,1
	nekonata	4	0,8
infanoj	jes	298	61,8
	ne	183	38,0
	nekonata	1	0,2
ekonomia situacio	tre bonstata	14	2,9
	bonstata	125	25,9
	mezklasa	250	51,9
	finance malforta	87	18,0
	nekonata	6	1,2

Resume pri demografiaj variabloj oni povus diri ke la enketitoj venas plejparte (70%) el Eŭropo aŭ t.n. okcidentaj, "eŭropeskaj" landoj (Usono, Kanado, Aŭstralio). Grandproporcie temas pri viroj (ĉ. 73%) alte edukitaj (ĉ. 68%), vivantaj en kunpartnera komunumo (65%) kaj apartenantaj al la t.n. meza klaso (ĉ. 78%). Finance relative bonstataj kaj kutime praktikas altnivelajn profesiajn okupojn aŭ plenumas mezrangajn oficojn. Signifa estas la partopreno de instruistoj kaj artistoj. Plimulto havas infanojn (ĉ. 62%). La plimulto ankaŭ estas pensiuloj (51,2%) kaj jam en la tria aĝo: tri kvaronoj jam aĝis pli ol 50 jarojn.

Jen do ebla profilo de averaĝa esperantisto. Restas malfacile, kiel ĉiam en statistikaj esploroj, scii ĉu temas pri averaĝo valida por la tuta populacio de esperantistoj aŭ ĝi nur koncernas la samplon en tiu ĉi esploro. Pluraj esploroj montras ke ĝuste viroj, alte edukitaj, mezklasaj kaj pli aĝaj, pli volonte respondas enketojn. Ĉiukaze ni prenu la ciferojn kiel tendencomontrajn.

1.2 Profesia vivo kaj laborsituacio

Kiel oni povus atendi por tia aĝostrukturo, la plimulto de la enketitoj estis pensiuloj (51,2%) dum 37,3% ankoraŭ aktive laboris. La cetero konsistis el senlaboruloj (3,9%), dommastrinoj (1,9%) kaj studentoj (1,7%). Iom pli klaran ideon pri la profesia vivo ni ricevas el la respondoj pri nunaj aŭ iamaj profesioj. Tiuj informoj konfirmas la baze mezklasan socian pozicion de la enketitoj, kvankam oni devas vidi ĝian lokon ie en la mezo aŭ la supro de la skalo, certe pro la influo de ĝenerale alta eduknivelo: ĉ. 43% estas inĝenieroj, kuracistoj aŭ similaj alte edukitaj profesiuloj. Inter la oficistoj kaj administrantoj (eventuale klasigeblaj kiel suba meza klaso) troviĝas la transira kategorio de instruistoj, artistoj kaj similaj profesioj. Antaŭaj esploroj montris tre grandan partoprenon de instruistoj en la Esperanto-movado ĝenerale, samkiel en similaj sociaj movadoj.

1.3 Diversaj ŝatokupoj

Iom pli klaran ideon pri la kultura profilo de esperantistoj oni ricevas post konsulto de respondoj al la demandoj pri diversaj ŝatokupoj, krom Esperanto. Esperantistoj estas homoj kun pluraj hobioj; kelkaj havis vere multajn sed la plej multaj almenaŭ 3 aŭ 4. Tio indikas du aferojn: 1. ke temas pri personoj kun vastaj interesoj, 2. ke ili disponas pri sufiĉa tempo kaj mono por praktiki tiujn hobiojn. La listo de menciitaj hobioj montras ke la interesoj de esperantistoj estas ĉefe intelektaj: arto kaj kulturo, naturo, historio, muziko, scienco, politiko k.s. Gravan lokon sendube okupas vojaĝado (sur la tria loko).

Sporto kaj aliaj korpaj okupoj ne serioze rolas kaj ankaŭ ne klaras kion precize signifas la mencio de "naturo" kiel hobio (dualoke, post arto kaj kulturo). Ĉiuokaze ekzistas speciala rilato al la naturo, pri kio aparte aludas kaj interese hipotezas ankaŭ Forster (1982). El aliaj fontoj ni scias ke esperantistoj estas aktivaj partoprenantoj de diversaj mediprotektaj movadoj, tiel ke ankaŭ tiu ĉi intereso tre verŝajne manifestiĝas kiel intelekta, politika, socia aŭ scienca temo, ne tiom en la aktiva vivo en naturo aŭ konkretaj agoj (plugado, bredado, kultivado, purigado k.s.).

Kiel tipaj mezklasanoj ili ĝuas la naturon, do rilatas al ĝi iusence kiel konsumantoj (Thorstein Veblen nomus ilin, kun ironio de socia kritikisto, *the leisure class*). Esperantistoj estas ŝajne pli personoj de libroj kaj ideoj ol homoj de agoj kaj faroj. (Mirigas ke inter diversaj hobioj fremdaj lingvoj ne estis tiel ofte menciitaj kiel ŝatokupo!) Esperanto estas evidente movado unuavice de intelektuloj, artistoj kaj mezklasaj distriĝemuloj. Por aldone konvinkiĝi pri tio ni vidu la liston de fakaj asocioj en kiuj niaj enketitoj membras: instruistoj, religiaj asocioj, komercistoj, etnistoj, sciencistoj. Tiuj ĉi informoj faciligas al ni kompreni kiaj personoj fakte estas la esperantistoj. Ni vidu nun kiel niaj enketitoj profiliĝas kiel esperantistoj.

2 La lingvo kaj ĝia movado

Esperanto estas antaŭ ĉio *lingva* movado: por ĝin eniri kaj por profiti de ĝiaj avantaĝoj necesas unue lerni la lingvon. Ju pli bone oni ĝin regas des pli aktive kaj sencohave oni povas partopreni en la komunumo. Tial ni komencu analizi Tabelon 3 de la lasta respondo, tiu pri la lingvokono. Ni ne forgesu ke temas pri propra takso kaj ne pri ia objektiva mezuro. Tamen, eĉ se temas pri takso tute relativa kaj subjektiva tre indika estas la informo ke pli ol 80% taksas sian lingvonivelon bona (3) ĝis tre altnivela (5).

Simile ni povas rimarki ke preskaŭ 90% de la enketitoj estis aktivaj en la Esperanto-movado, el kiuj ĉ. 30% intense. Pli ol 85 personoj aktivas jam pli ol 10 jarojn, kaj la plej granda grupo estas aktiva jam dum pli ol 30 jaroj. Ke temas pri forta ligo, pli ol nura hobio, montras ankaŭ la fakto ke ĉ. 40% de la familianoj jam lernis aŭ intencas lerni Esperanton. Simile montris ankaŭ pluraj aliaj sociologiaj esploroj. Ofte oni renkontas la estontan vivpartneron ene de la Esperanto-komunumo. Tiam Esperanto havas kvazaŭ naturan lokon en la familioj kaj vivo de esperantistoj (vd. Rašić 1996).

Tabelo 3: Enketitoj laŭ kelkaj variabloj koncerne esperantistecon (N = 482)

Demando		**N**	**%**
Ĉu la familianoj de la enketito parolas Esperanton?	jes	162	33,6
	planas lerni	31	6,4
	ne	267	55,4
	nekonata	22	4,6
Kiom da jaroj la enketito aktivas kiel esperantisto ?	ĝis 3 jarojn	26	5,4
	4 ĝis 9 jarojn	42	8,7
	10 ĝis 19 jarojn	106	22,0
	20 ĝis 29 jarojn	97	20,1
	30 jarojn aŭ pli	209	43,4
	nekonata	2	0,4
Grado de movada aktiveco	neaktiva	55	11,4
	modere aktiva	280	58,1
	tre aktiva	143	29,7
	nekonata	4	0,8
Propra takso de kono de Esperanto	1 (minimuma)	14	2,9
	2	25	5,2
	3	142	29,5
	4	186	38,6
	5 (maksimuma)	85	17,6
	nekonata	30	6,2

2.1 Membreco en Esperanto-organizoj

Pli detalan bildon pri la movada aktivado oni ricevas el la informoj pri membreco en diversaj Esperanto-organizoj. La granda plimulto (ĉ. 87%) estas membroj de la landa asocio de UEA kaj 67% membras ankaŭ en loka klubo, ĉ. 30% aktivas krome en diversaj fakaj kaj aliaj asocioj, kaj 12% en SAT (sufiĉe alta procentaĵo fakte, se konsideri la ĝenerale nealtan kvanton de SAT-membroj – kiu, cetere, malkompreneble sekretas). En la Esperanto-Civito membras 2,6% aŭ 12 enketitoj (la nombro de membroj de la Civito ŝajnas eĉ pli granda sekreto!).

2.2 Abono al diversaj gazetoj

La respondoj pri abonoj al diversaj Esperantaj gazetoj donas al ni rangliston de la plej popularaj revuoj en la tempo de la enketo. *Esperanto, Heroldo, Monato* kaj *Eventoj* plej oftis, kaj en la kategorio "aliaj" sekvas: *La Ondo de Esperanto, Kontakto, Juna Amiko, Literatura*

Foiro, Fonto, La Gazeto, Brazila Esperantisto, Internacia Pedagogia Revuo, Le monde de l'Espéranto, Sennaciulo, Esperanto INFO, Espero Katolika, Litova Stelo, Laŭte, Dia Regno, Esperanto aktuell, La Brita Esperantisto ktp. Tiu ĉi informo povas servi ankaŭ por konstati la guston kaj efektivajn bezonojn de averaĝaj movadanoj. Praktike ĉiuj ceteraj revuoj estas lokaj eldonoj de diversaj landaj aŭ fakaj asocioj. Bedaŭrinde, kelkaj el la plej popularaj kaj multjaraj gazetoj intertempe ĉesis aperi. Kompense intertempe aperis aliaj, novaj, revuoj.

2.3 Legado de libroj en Esperanto

Ĉiuj enketitoj legas de tempo al tempo libron en Esperanto (1-3 librojn jare 48,5%), kaj duonon el ili oni povas konsideri fervoraj legantoj kiuj legas 4 aŭ pli da libroj jare (22% legas 7 aŭ pli da libroj jare). La fakto ke ĉiuj legas almenaŭ unu libron jare indikas ke esperantistoj en tiu ĉi senco ne estas kompareblaj kun averaĝaj parolantoj de aliaj lingvoj: en multaj eĉ alte evoluintaj landoj granda kvanto da homoj tute ne legas librojn.

2.4 Eklerno de la lingvo

Nun pri la demando kiamaniere la enketitoj lernis Esperanton. Plej gravis lernado en kurso (31,7%) aŭ memlernado el libro (26,1%). Koresponda metodo troviĝas ankoraŭ relative alte kun 6%, dum reta lernado apenaŭ gravis (nur 10 personoj). Sed ni ne forgesu la fakton ke la enketitoj en nia samplo jam de jardekoj estis esperantistoj, krom malgranda procentaĵo de novuloj. Do, tiuj ĉi informoj havas nur historian valoron. Estus interese vidi kiel la situacio ŝanĝiĝis nuntempe kiam la reto ŝajne ludas pli kaj pli gravan rolon, ĉefe inter la pli junaj esperantistoj. Necesus scii kiel lernis la lingvon la plej novaj membroj, aliĝintaj dum la lastaj kvin ĝis dek jaroj. Nur neglektinda kvanto lernis Esperanton ene de familio (17 personoj). Aliaj informoj tamen montras ke en ĉ. triono de la familioj okazas transdono de tradicio, sed evidente ne nepre ankaŭ de la lingvo mem: la familianoj plejparte lernis ĝin laŭ iu el la klasikaj metodoj. Unuopaj enketitoj ofte lernis laŭ diversaj metodoj, sed pli ol duono el ili ankaŭ lernis en kursoj aŭ/kaj mem, aŭ nur poste koresponde. Aliaj metodoj malpli gravis. Kvin enketitoj lernis la lingvon denaske.

2.5 Maniero de varbiĝo por Esperanto

La esploristoj interesiĝis kiamaniere la enketitoj venis en kontakton kun Esperanto kaj kiel ili movadaniĝis. Ankaŭ tiuj ĉi informoj havas precipe historian valoron ĉar la efikoj de novaj varbkanaloj, kiel la Reto, povus esti mezurataj nur nun. Estas interese ke nur en ĉ. triono de la kazoj la instigo venis rekte de iu amiko aŭ familiano (30,9%). Poste venas informoj peritaj de iu nerekta fonto: gazeto, afiŝo, anonco, varbilo, radio k.s. La rolo de tiuj ĉi informiloj en la nuna epoko verŝajne eĉ pli gravas. Diversaj esploroj montras ke kreskas la rolo de nerektaj stimuloj lerni Esperanton, kvankam la personaj kontaktoj ĉiam restos gravaj.

Tiu ĉi informo povus estis interesa por la movadaj informistoj kaj varbistoj. Ĉar la homoj inter si malsamas laŭ la maniero kiel ili reagas al diversaj instigoj, ŝajnas prudente plue informi pri Esperanto diversmaniere, kio signifas konstante sekvi la evoluojn sur tiu kampo kaj uzi la plej modernajn komunikilojn. Relative modesta estas la rolo de televido, do de la plej potenca amaskomunikilo: homoj pensas tion kion la televido diras. La rolo de Esperanto en TV estas en la plej multaj landoj tre malgranda.

Plia konvinkiĝo pri la egala graveco de diversaj metodoj de informado pri Esperanto aperas se ni grupigas la rezultojn laŭ la modelo uzita de Reuben Algot Tanquist (1927, 1927/28), la unua movada sociologo kaj empiria esploristo (detale pri Tanquist en Rašić 1994). Li dividis diversajn stimulojn en *rektajn* kaj *nerektajn*, depende de tio ĉu la persono estis influita rekte de alia persono aŭ pere de iu amaskomunikilo (libro, afiŝo, radio, varbilo k.s.). Tanquist siatempe ricevis malsamajn rezultojn por viroj kaj virinoj, eŭropanoj kaj

usonanoj, aĝaj kaj junaj. En lia esploro pli gravis la rektaj instigoj, sed niaj rezultoj – kiujn oni ja povas vidi ankaŭ kiel iaspecan internacian mezumon – montras preskaŭ ekvilibran bildon: rektaj instigoj 51,7%, nerektaj 48,3%. Danijela Drakula (2003) en sia esploro de kroataj esperantistoj trovis ke, sendepende de la aĝo de la enketitoj, la rekta instigo (68%) gravis eĉ pli signife ol ĉe Tanquist (51%). Diversaj malrektaj informoj estis je 32% ĉe kroatoj kaj 41% ĉe Tanquist. La rezultoj evidente varias depende de landoj kaj regionoj. En nia esploro, inter la nerektaj stimuloj plej gravis la influo de iu gazeta artikolo aŭ intervjuo (18,4%) kaj nur poste iu varbanonco (7,6%) aŭ libro (7,4%). La radio influis nur en 3,4% de la kazoj. La superrego de perpersona varbmaniero eble estas grava limigo al la kresko kaj evoluo de la Esperanto-komunumo.

3 Partopreno en Universalaj Kongresoj

Partopreno en UK estas sendube indiko pri la grado de aktiveco en la Esperano-movado. Forster (1982) en sia esploro malkovris rektan rilaton inter idealismo kaj partoprenado en internaciaj Esperanto-kongresoj. Preskaŭ duono el niaj enketitoj partoprenis minimume 4 UK-ojn, kio faras ilin taŭga kaj motivita celgrupo por tiu ĉi esploro. Kiel atendite, grandan proporcion konsistigas la partoprenintoj de la tiam ĵus okazinta 87-a UK en Fortalezo (2002): temas pri triono de ĉiuj respondintoj. Nur 12,7% neniam vizitis iun UK. Kompense, inter tiuj kiuj vizitis pli ol kvar kongresojn, troviĝas multaj, nome ĉirkaŭ kvarono de la tuta samplo, kiuj kongresis 9 fojojn aŭ pli ofte (maksimume 34!). Tiujn oni certe povas konsideri kiel "harditan kernon" de regulaj kongresanoj kaj fervoraj esperantistoj. Ĉiuokaze, ĉ. du trionoj (68,3%) regule kongresis dum la pasintaj kvin jaroj kaj 86,3% kongresis almenaŭ unufoje

Kiam UK okazas ekster Eŭropo ĝi kutime havas 1200-1600 partoprenantojn. Inter ili pluraj venas el la kongreslando mem kaj 100 ĝis 200 registritaj kongresanoj ne vere ĉeestas en la kongreso. Ĉirkaŭ 800 ĝis 1000 estas regulaj venantoj. Ĉar nun temis pri kongreso en Brazilo, do ekster Eŭropo, ni certe ricevis respondojn ĝuste de tiu grupo de fideluloj kaj fervoruloj. Plian kontrolon de tiu fakto ni ricevas studante la jarojn de laste vizitita kongreso. Ni vidas ke pluraj pli-malpli regulaj kongresvizitantoj malkongresis en la jaro 2000 (Tel Avivo, Israelo). Tiun kongreson partoprenis nur la kerno, do fidelaj kaj konstantaj kongresanoj, dum la aliaj iom paŭzis dum tiu ekstereŭropa, iom kosta kaj alimaniere eksterordinara, kongreso. La fervoruloj do ĉiam venas, ankaŭ al la foraj kongresoj, kaj ni havas ilin ankaŭ en tiu ĉi samplo.

3.1 Kialoj de nepartopreno en UK

La vera demando ne estas "Kial esperantisto volas viziti Universalan Kongreson?" sed ĝuste: "Kial iu ne partoprenas ĝin?". La ciferoj montras ke tiurilate apenaŭ estas diferenco inter enketitoj kiuj jam foje kongresis kaj tiuj kiuj neniam spertis la etoson de UK.

Tabelo 4: Graveco de praktikaj elementoj por partopreni UK

Praktikaj elementoj	n	M*	σ[3]
alteco de la aliĝkotizo	400	3,05	1,44
kostoj de vojaĝo	431	3,94	1,23
kostoj de loĝado	423	3,70	1,22

[3] Per la simbolo [σ] (sigma) estas donita la mezuro de norma deviado (angle: *standard deviation*), kio estas statistika indiko pri diseco de rezultoj. Faktoro sigma diras al ni kiom la rezultoj varias disde la mezuma valoro: ju pli alta la devio des pli disaj estas la rezultoj. Tio signifas ke ĉe malaltaj valoroj de s (kostoj de vojaĝo, loĝado kaj manĝoj) la rezultoj plej proksimas al la mezumo (do pli-malpli ĉiuj relative samopinias), dum ĉe elementoj kiel sanstato, alteco de aliĝkotizo, klimato k.s. la opinioj iom pli diverĝas. En Tabelo 4 ĉiuj sigmaj valoroj estas fakte tre malaltaj; la diferenco povus ankaŭ hazardi.

kostoj de manĝoj	402	2,90	1,23
kostoj de ekskursoj	389	2,72	1,32
Klimato	394	2,43	1,39
politika situacio en la lando	404	3,04	1,40
sekureco, krimoj k.s.	398	3,09	1,43
sankialoj (via, familia)	389	2,98	1,53

** kolumno M montras la averaĝan noton inter 1 kaj 5*

Praktike neniu respondas ke mankas ĝenerala intereso (nur 4 enketitoj el la grupo de personoj, kiuj neniam kongresis) kaj tre malmultaj montras malemon al tia tipo de aranĝoj. Ĉefe temas pri manko de libera tempo, manko de mono por vojaĝoj aŭ diversaj familiaj malhelpoj, malsano en familio aŭ io simila.

Kvankam la procentaĵoj ĉe ĉiu kialo regule pli altas ĉe la grupo de nekongresintoj, oni povas konkludi ke praktike ĉiuj esperantistoj emas kongresi se ili havas okazon kaj kondiĉojn por fari tion. Malmultaj kredas ke nesufiĉa kono de Esperanto devus esti kialo por ne kongresi. Notindas ke ĉe la grupo de nekongresintoj diversaj familiaj malhelpoj signife pli rolas ol ĉe la alia grupo. Denove do altrudiĝas la interpreto ke ankaŭ ili volonte kongresus, se ili nur povus.

Entute 179 enketitoj citis iun faktoron kiel nepran kondiĉon por partopreni en UK. Plej ofte estis simple la mono. La dualoke citita kialo "malproksimeco" verŝajne ankaŭ estas ligita kun mono. La ceteraj motivoj de nepartopreno en kongreso konsistas el kombino de diversaj faktoroj kiel manko de libertempo, sano, alta aĝo k.s. El Tabelo 4 ni povas klare elsarki la ordon de diversaj elementoj laŭ graveco: sendube elstaras la kostoj de vojaĝo kaj loĝado. Post ili venas faktoroj kiel sekureco, alteco de kotizo, politika situacio en la lando, sanokialoj, kaj kosto de manĝoj (pli-malpli egale). La klimato kaj kosto de ekskursoj aperas fine sur la listo.

Estas interese ke la alteco de kotizo ne tiom elstaras kiel malinstiga faktoro, kvankam ĝi estas plej ofte menciata en kritikaj tekstoj pri kongresoj. Tiu probable havas pli simbolan ol realan signifon. Eĉ kiam la kotizoj estas malaltaj la nombro de kongresanoj esence ne kreskas pro influo de aliaj faktoroj kaj kostoj, kiuj tamen restas tre altaj. La kotizo formas nur negrandan parton de tiuj kostoj kiel tuto.

3.2 Motivoj por partopreno en UK-oj

Multe pli interese estas rigardi kio rolas kiel instigaj motivoj por aliĝo al UK, taksitaj sur skalo inter 1 kaj 5 (laŭ la graveco). El Tabelo 5 ni povas facile ricevi la rangon de tiuj motivoj: 1. intereso pri la Esperanto-movado, 2. praktikado de la lingvo, 3. idealoj de Esperanto, 4. renkontiĝo kun amikoj, ktp. Tiujn ĉi motivojn ni povas facile traduki al la sinsekvo: 1. movado, 2. lingvo, 3. ideo(logio), 4. komunumo. Nur post tio venas intereso pri la lando mem kaj pri la kongresa programo: esence do ne multe gravas kie la kongreso okazas kaj kia estas la programo!

Tabelo 5: Graveco de la motivoj por partopreni UK

Motivoj	**n**	**M**	**σ**
Intereso pri la lando, regiono	410	3,61	1,20
intereso pri la Eo-movado	428	4,01	1,13
intereso pri la programo	402	3,44	1,13
praktikado de la lingvo	427	3,99	1,22
idealoj de Esperanto	411	3,86	1,23
renkontiĝoj kun amikoj	418	3,76	1,19
akiro de novaj kontaktoj	408	3,39	1,26

3.3 Kongresa programo

Iom pli nuancitan bildon oni ricevas studante la respondojn pri la kongresa programo. En Tabelo 6 gravas rimarki kelkajn kazojn de iom pli granda disperso de rezultoj, kio montras ke la opinioj pri iuj kongreseroj iom pli diverĝas de la mezaj valoroj. Interese ke tio koncernas kaj la solenajn inaŭguron kaj fermon. Plej sube, laste en la rangolisto, aperas la religiaj aranĝoj – ne mirinde ĉar esperantistoj estas aŭ modelaj kredantoj aŭ ateistoj! (Rašić 1994) – sed la samo validas ankaŭ por la Cseh-aranĝoj.

Oni starigis ankaŭ demandon kiujn programerojn oni povus ellasi el la programo. Alte sur la listo staris: 1. akceptoj, bankedo kaj simile, 2. religiaj aranĝoj (ĉ. 60 respondoj). Poste sekvis ekskursoj, lingvaj kursoj, komitatkunsidoj, Cseh-kursoj (po ĉ. 15 ĝis 18), koncertoj, solena fermo kaj malfermo, teatraĵoj, internacia koruso (po 11 ĝis 14) k.s. La kvanto de la respondoj estas foje tro malgranda por ĝeneraligoj sed tio ja montras certan tendencon ĉe parto de kongresanoj. La demandon respondis entute 242 enketitoj. Ili donis 362 respondojn (kelkfoje pluroblajn). Oni do tamen notu la liston kiel siaspecan esprimon de la voĉo de la poppolo.

Tabelo 6: Averaĝa grado de aprezadode diversaj programeroj

Programeroj	n	M	σ
libroservo	407	4,09	1,12
nacia vespero	403	4,06	1,09
solena inaŭguro	404	3,79	1,32
prelegoj pri la lando	390	3,75	1,04
teatraĵoj	383	3,73	1,18
ekskursoj	402	3,62	1,26
koncertoj	382	3,61	1,16
primovadaj temoj	364	3,60	1,08
IKU-prelegoj	344	3,59	1,27
libro-aranĝoj	354	3,56	1,15
Esperantologia konferenco	352	3,51	1,27
solena fermo	389	3,49	1,33
kunsidoj de fakaj asocioj	366	3,45	1,25
ekspozicioj	362	3,41	1,11
aranĝoj por aktivuloj	330	3,24	1,14
internacia koruso	351	3,05	1,32
lingvaj kursoj	341	2,97	1,42
komitatkunsidoj	339	2,71	1,28
Cseh-aranĝoj	305	2,57	1,41
akceptoj, bankedoj k.s.	356	2,53	1,28
religiaj aranĝoj	346	2,29	1,45

4 Opinioj pri konkretaj kongresaj servoj

Kompreneble, la celo de la enketo estis kolekti ankaŭ konkretajn informojn kaj opiniojn pri kelkaj konkretaj aspektoj de la kongreso. Oni ekz. demandis la enketitojn kian tipon de kongresejo ili preferas, petis ilin taksi la kvaliton de la ekzistantaj kongresaj servoj kaj enketis

pri la neceso de iuj novaj servoj, oni ankaŭ esploris ĉu estas ĝenerala kontento pri la kongresaj servoj. Fine oni demandis la opinion pri la ĝenerala strukturo de UK. La respondoj kelkfoje estis tute neatenditaj.

4.1 Tipo de kongresejo

Pri la taŭgeco de la kongresejo oni ofte diskutas, ĉefe post kongreso por kiu ĝi ne estis plej adekvate elektita. La diskuto foje ne estas tre sencohava ĉar oni malofte havas veran elekton: oni uzas aŭ la solan kongresejon kiun la elektita kongresurbo havas aŭ oni uzas la plej ekonomian. Se en la kongresa urbo estas pluraj kunvenejoj, tiuj tute konvenaj estas kutime ankaŭ la plej multekostaj. Ni vidis ankaŭ, ke averaĝa kongresano estas sufiĉe dorlotita kiam temas pri rilato inter servoj kaj financoj: ŝi/li ne pretas pagi pli altan kotizon sed ja volas havi maksimuman plezuron kaj plene konvenan lokon por tiu plezuro. Tiaj deziroj estas tre kompreneblaj, sed ofte malhavas realisman bazon. Tiom pri la senfrukteco de la diskuto en situacio kiam malestas elekteblo.

Por la plimulto la demando de kongresejo aŭ tute ne gravas (43,6%) aŭ oni pleje kontentiĝas ĝuste pri ordinara kongresejo, do vera kongrescentro, en kiu niaj kongresoj okazas plej ofte. Nur dek procentoj preferus universitatan aŭ lernejan kongresejon kaj 5% preferas hotelajn kunvenejojn (kiuj siaflanke praktike identas kun la ordinaraj kongrescentroj). Ankaŭ en la estonteco decidan rolon ludos plej probable la hazardo, t.e. la konkreta haveblo de la ejoj. La UK tiam devas nur adaptiĝi al la lokaj kondiĉoj. Ne necesas mencii ke la aranĝo de iuj programeroj tre grave povas dependi de la realaj disponebloj en la konkreta kongreseja spaco.

4.2 Deziratataj novaj servoj

Al la demando ĉu oni ŝatus enkondukon de iuj novaj servoj, la plej multaj kongresanoj konsentis ke bonvenus pli da servoj ligitaj kun la transporto en la kongresa urbo/lando, sed iom malpli multaj vidas la bezonon, ke UEA aranĝu flugojn. Verŝajne la plej multaj povas mem aranĝi pli konvene aŭ pli malmultekoste. Tamen ankoraŭ 43% ja aprezus ankaŭ tiun servon. Manĝaranĝojn mencias eĉ malpli da kongresanoj.

Granda plimulto ne pensas ke oni devus havi pli da ekskursoj. Tio kontrastas kun la amasaj mendoj dum UK: ekskursoj estas fakte la plej popularaj servoj en ĉiuj kongresoj kaj la plej frekventataj programeroj, kvankam ili ekstre kostas. Ni ankaŭ ne forgesu ke turismado okupas altan trian lokon en la listo de hobioj de niaj enketitoj. Oni eble devas kompreni tiujn ĉi respondojn kiel esprimon de starpunkto ke la ekskursoj ne estas esenca ero de la kongresa programo aŭ ke la enketitoj estas tute kontentaj pri la nuna kvanto de ekskursoj. Nur 61 enketitoj aldonas ion konkretan kiel proponon por novaj servoj; tio fakte ne donas multon novan aŭ temas pri individuaj deziroj kiujn oni ne povas facile kontentigi.

Resume: pli da zorgo por transporto kaj eventuale manĝoj estus bonvena: pri la cetero la kongresanoj elturniĝos mem. Ankaŭ eblas la interpreto ke la kongresanoj plejparte ne havas bezonon por novaj servoj kaj ĝenerale kontentas pri la servoj ricevitaj de LKK kaj la Kongresa Fako de UEA.

4.3 Kontento pri servoj de UEA kaj LKK

Pritaksante (sur skalo de 1 ĝis 5) la kvaliton de helpo ricevita de LKK kaj la Kongresa Fako de UEA preskaŭ 60% donas la plej altajn notojn (4 kaj 5) kaj pliaj 15,8% konsideras ĝin simple bona (meze bona – 3). Nur 4,8% donas tute malaltajn notojn al tiuj servoj. Plenaj 20% ne respondis al tiu demando, pro nekonataj kialoj. Sed eĉ se ni prenas la nerespondojn kiel principe negativan opinion (kio, kompreneble, ne estas ĝusta!), restas la fakto ke la plimulto

kontentas en granda mezuro pri la kongresaj servoj. La mediana noto (la plej ofta valoro) estas 4, eventuale oni povus strebi pli en la direkto de 5, sed tio ĉiuokaze restas bonega rezulto kaj favora juĝo pri la laboro de UEA kaj LKK (Tabelo 7).

Tabelo 7: Taksado de helpo de la Kongresa Fako de UEA kaj de LKK (N = 482)

Takso de la helpo	n	%
(4) ĝenerale bona	195	40,5
(5) tute kontentiga	89	18,5
(3) bona	76	15,8
(2) nesufiĉe helpa	21	4,4
(1) malhelpa	2	0,4
nekonata	99	20,5
Entute	482	100

4.4 Kvalito de informiloj kaj kongresaj dokumentoj

Simile ĝenerala kontento regas ankaŭ pri diversaj kongresaj informiloj, pri kiuj la kongresanoj donas al ni ankaŭ la aktualan rangoliston laŭ ilia graveco. Tiu ranglisto estas prezentita en laŭvica ordo en Tabelo 8. Sendube plej gravas por la partoprenanto la Dua Bulteno; tiutempe relative malmulte gravis la TTT-paĝoj de UEA. Ni memoru ke la enketo okazis en 2002 kiam UK-paĝoj ankoraŭ ne funkciis plene kaj ne tre bone. Estus interese ekscii kion la kongresanoj pensas pri ili nun kaj ankaŭ kiom niaj kongresanoj entute uzas la Interreton, se konsideri ke temas pri relative aĝa populacio.

Iom alian ordon ol tiun en Tabelo 8 oni ricevas se oni demandas, kiujn informilojn la kongresanoj mem trovas plej utilaj. Tiam la vicordo estas: Dua Bulteno, Unua Bulteno, Aliĝilo. La artikoloj en Esperanto-gazetaro kaj kongresaj komunikoj venas nur poste: oni fakte atendus iom pli pozitivan takson. La Dua Bulteno laŭ ĉiuj kriterioj restas la plej grava kaj plej ŝatata informilo. Ni ne forgesu ke ĝi fakte informas ĉefe pri loĝado kaj ekskursoj, servoj kiujn la kongresanoj juĝis *ne* tiom gravaj por la kongreso! Estas strange ke oni ne demandis pri la Kongresa Libro, pri kio atentigis kelkaj enketitoj. Ĝi estas certe la plej utila dumkongresa informilo. Kelkaj indikis ke la Dua Bulteno estas utila sed foje aperas malfrue.

Tabelo 8: Averaĝa valoro de informiloj kaj kongresaj dokumentoj

Informiloj kaj kongresaj dokumentoj	n	M	σ
Dua Bulteno	366	4,35	0,97
Aliĝilo	360	3,98	1,10
Konfirmilo	301	3,94	1,16
Unua Bulteno	371	3,91	1,19
Artikoloj en E-gazetoj	349	3,81	1,09
Kongresaj Komunikoj	292	3,81	1,13
mendilo/mendoregularo	275	3,73	1,15
TTT-paĝoj de UEA	235	3,30	1,39
Kongresaj TTT-paĝoj	220	3,28	1,43

4.5 Kontento pri rapideco kaj kvalito de diversaj servoj

Informiloj en presitaj formoj estas tre gravaj por la kongrespartoprena procezo. Eĉ pli gravaj estas tute personaj servoj kiel traktado de mendoj, funkciado de giĉetoj, korespondado kaj telefonado kun la Centra Oficejo k.s. Ĉe tiuj servoj la kongresano venas en rektan kaj tute personan kontakton kun la kongreso kaj ĝiaj organizantoj. Tial tre gravas scii kiel la enketitoj vidas tiun parton de la kongresa organizo. Tabelo 9 estas tute klara pri tio. La rezultoj malmulte devias de la averaĝaj valoroj, kio indikas ke temas pri ĝenerale konsentataj opinioj.

Tabelo 9: Averaĝa kontento pri rapideco kaj kvalito de diversaj servoj (mezuma valoro M, kaj norma devio σ)

Diversaj servoj	n	M	σ
traktado de aliĝiloj	328	3,82	1,01
ekskursa servo	274	3,74	1,05
traktado de pagoj	297	3,74	1,08
traktado de mendoj	297	3,74	1,00
funkciado de giĉetoj	304	3,73	0,93
korespondado kun CO	284	3,71	1,06
loĝiga servo	280	3,64	1,08
vojaĝservoj	214	3,50	1,17
restoraciaj servoj, manĝoj	280	3,22	1,12
bankedo	201	3,10	1,35

La kongresanoj estas ĝenerale kontentaj pri la traktado de aliĝiloj kaj sufiĉe kontentaj pri la ekskursa servo, funkciado de giĉetoj, traktado de pagoj kaj mendoj. Iom malpli da kontento estas pri korespondado kun CO, loĝiga servo kaj vojaĝservoj. Plej malaltas la kontento pri la restoraciaj servoj kaj bankedo (ĉe la bankedo ankaŭ la deviado de rezultoj plej altas). Pri la bankedo, cetere, la opinioj kutime estas tre dividitaj ĉar multaj kongresanoj vidas ĝin kiel "burĝan" aranĝon kiu substrekas la klasajn kaj ekonomiajn diferencojn inter la kongresanoj. Krome la bankedaj gastoj estas kutime tre postulaj kaj kritikemaj klientoj kaj la opinioj pri la kvalito de bankedo kaj manĝoj povas tre varii, tial jen iom pli alta normdevio. Ni ankaŭ memoru ke la bankedo okupis la unuan lokon sur la listo de kongreseroj kiujn oni povus malhavi.

4.6 Opinioj pri la estonteco de UK

Al la demando kiel oni vidas la estontecon de UK, respondis 261 enketitoj. Multaj donis plurajn respondojn sed kelkaj temoj ja ripetiĝas, ekzemple: bona, optimisma, same kiel ĝis nun, pli maljuna, por riĉuloj, malfermita por malriĉuloj, kun pli da partoprenantoj, malpli kosta, pli konata, malfermita al neesperantistoj. Pli oftas la respondoj kun pozitivaj konotacioj pri la estonteco de UK ol kun negativaj.

5 Bazaj celoj de UK kaj konkretaj kongresaj servoj

La aprezadon de unuopaj programeroj kaj servoj oni pli bone komprenos rigardante kion la enketitoj opinias pri la bazaj celoj de UK. Unualoke staras publika prezento de Esperanto al la ekstera mondo. Tio estas atentinda, ĉar niaj kongresoj plejparte restas internen orientitaj. Sur la dua loko venas la interna graveco formulita "kiel fortigo kaj evoluigo de la Esperanto-kulturo".

Tabelo 10: Graveco de bazaj celoj de UK

Bazaj celoj	n	M	σ
okazo por publika prezento de Esperanto al ekstera publiko kaj instancoj en la kongresa lando	427	4,38	0,98
fortigo kaj evoluigo de la Esperanto-kulturo	421	4,31	0,94
okazo por plani la agadon por Esperanto en la mondo	410	4,09	1,12
kleriga aranĝo kie la kongresanoj plibonigas siajn lingvo-scion kaj konon de la movado	417	3,94	1,08
distro por la partoprenantoj (turismo, spektakloj k.s.)	385	3,16	1,20
financa bazo por la agado de UEA kaj de la gastiganta landa asocio	382	3,13	1,19

Tiuj rezultoj bone ilustras la bazan tezon de Forster pri valororientita kaj normorientita interpretoj: La movado estas samtempe propagandista, finvenkista, sed ja ankaŭ komunumo en si mem. La statistika diferenco inter la du orientiĝoj (la unuaj du opinioj) estas neglektinda – la movado nepre devas havi kaj flegi ambaŭ aspektojn, opinias la enketitoj[4].

Poste listiĝas la pure movada kaj la kleriga aspektoj, kaj fine distro kaj financa signifo por la movado. Pri la financa aspekto validas la samo kiel pri impostoj: neniu ŝatas ilin, eĉ se oni konsentas ke ili estas utilaj same kiel neeviteblaj. Tamen la kvanto kiu konsideras ankaŭ tiun aspekton, estas ankoraŭ sufiĉe granda.

La liston de prioritatoj oni ankaŭ povus resumi kiel sinsekvon: ekstera celo / interna ideo / evoluigo de la komunumo / evoluigo de la lingvo kaj lingvokomunumo.

6 Ĝenerala strukturo de UK

6.1 Ĝenerala kontento: ŝanĝi nenion

Fine oni enketis pri la ĝenerala strukturo de UK. Oni povis konkludi ke kongresanoj favore pritaksas la ĝeneralan strukturon de UK. La plimulto kredas ke ne necesas ŝanĝi la bazan ideon pri la kongreso. Nur dualoke venas la opinio ke tamen necesus iom modernigi la strukturon, eĉ se ĝi principe estas en ordo. Tre malmultaj kredas ke la kongreso *ne* estas bone strukturita aŭ ke ĝi devus esti komplete restrukturita. La "klientoj" de UK principe ne volas ĝin havi alia. Tio estas grava konsidero antaŭ ĉiu decido ŝanĝi ion abrupte aŭ kerne.

Oni povus interpreti la rezultojn tiel ke ekzistas milda konsento pri tio ke UK ne ŝanĝiĝu kaj modera malkonsento pri ŝanĝo. Ni uzas la predikatojn *milda* kaj *modera* pro la fakto ke la mezuma noto estas malpli alta ol 4 (3,85 resp. 3,56). Alia konsidero estas la modala noto (la plej ofta noto) kiu estas pli alta ol 4 (plimulto de rezultoj dividita inter la du plej altaj taksnotoj 4 kaj 5).

[4] La Manifesto de Raŭmo emfazas la gravecon de la kongresoj entute kaj donas egalan gravecon al du aspektoj: "Punkto 4: **Kongresoj kiel vojo al kresko**: "Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni kaj rezervi la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj … kaj aliflanke necesas fortigi la uzon de Esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj …"

Tabelo 11: Sintenoj pri la UK-strukturo

UK-strukturo	n	M	σ
UK havas bonan strukturon, ne necesas ŝanĝi la bazan ideon pri la kongreso	347	3,85	1,17
UK estas principe taŭge strukturita, sed necesas iom modernigi ĝin	342	3,56	1,19
UK ne estas bone strukturita por plenumi siajn celojn	288	1,93	1,12
UK devus esti komplete restrukturita por esti efika	286	1,72	1,11

Tabelo 12: Sintenoj pri la UK-strukturo (N=482)

UK-strukturo		nekonata	1	2	3	4	5
UK havas bonan strukturon, ne necesas ŝanĝi la bazan ideon pri la kongreso	n	**135**	**24**	**21**	**61**	**119**	**122**
	%	28,0	5,0	4,4	12,7	24,7	25,3
UK estas principe taŭge strukturita, sed necesas iom modernigi ĝin	n	**140**	**23**	**45**	**79**	**109**	**86**
	%	29,0	4,8	9,3	16,4	22,6	17,8
UK ne estas bone strukturita por plenumi siajn celojn	n	**194**	**136**	**80**	**40**	**21**	**11**
	%	40,2	28,2	16,6	8,3	4,4	2,3
UK devus esti komplete restrukturita por esti efika	n	**196**	**180**	**42**	**40**	**13**	**11**
	%	40,7	37,3	8,7	8,3	2,7	2,3

6.2 Fermema kongreso de malfermema movado

Ni notu la malkoheron inter la proklamita deziro ke UK servu kiel konvinkilo al la ekstera mondo kaj la efektivo en kiu ĝi estas strukturita tiel ke oni praktike ekskludas la eblon de eksteramonda partopreno – ĝuste laŭ la deziroj de la grupo mem kaj pro la kontento de tiu kolektivo pri la ĝenerala strukturo de la kongreso (vd. Tab. 11 kaj 12). La kongreso principe estas kaj restas respegulado de la "Rondo Familia", kiu samtempe estas la realigo de la idealo kaj pruvo pri ĝia malo. Anstataŭ ŝanĝi la mondon oni kreis propran mikromondon, kies simbolo kaj enkorpigo estas ĝuste la Universala Kongreso de Esperanto.

Tio indikas pri ĝenerala konservemo de la esperantistoj rilate al propraj institucioj kaj tradicioj kaj montras ke la komunumo volas rekonon de la ekstera mondo sed ne nepre grandskalan ŝanĝon de la mondo: ĝi volas ricevi pravigon de sia idealo, sed ankaŭ pluiri en sia aktualo. La komunumo estas simple tro maljuna por plue reformismi, konservemo ja apartenas al ĝia naturo.

Surbaze de tiuj rezultoj oni ja povas eltiradi diversajn konkludojn pri la kongresanoj mem kaj pri iliaj sintenoj aŭ ilia valorsistemo. La konservemon de la grupo rilate eventualajn ŝanĝojn oni devas rigardi tra sociologia prismo, do kiel gravan indikon pri la komunumo mem. Socia grupo kiu deklaras ke ĝi volas ŝanĝi la mondon (almenaŭ lingvasence), ne kredas do ke necesas ŝanĝi la strukturon de siaj kunvenoj, kvankam ili ĝis nun ne kondukis al la realigo de tiuj celoj. La konkludo devus esti ke la kongreso – tia kia ĝi estas – ja taŭgas por iu alia celo grava por tiu komunumo, ekzemple ties kontinua rekreo. La kongreso meritas atenton de movadaj sociologoj kaj antropologoj, ĉar ĝi restas la plej grava manifestiĝo de tiu ĉi socia kolektivo, ankaŭ se tiu kolektivo efektive malsukcesas en realigo de siaj proklamitaj celoj.

7 Kongreso de movado aŭ komunumo?

7.1 Konfuzo pri la sankta triunuo: la tri elementoj de l' absoluto

La Esperanto-movado montriĝas do kiel esence raŭmisma[5] sed ĝi ne povas konfesi tion al si mem[6], ĉar la finvenkismo estas la plej grava parto de ties membildo, ĝi estas ties *raison d'être*[7]. Tial prave stariĝas la demando pri kia kongreso fakte temas: ĉu de eksteren orientita reforma movado aŭ de memcentrema komunumo kiu unuavice zorgas pri daŭrigo de sia propra ekzisto?

Esperantistoj daŭre restas konfuzitaj pri sia identeco kunkreata el tri elementoj – *lingvo*, *movado* kaj *komumumo* – la tri aspektoj de ĝia ekzistado[8]. Ĝi volis fariĝi movado por sukcesigo de tiu lingvo, sed rezulte de la malsukceso ĝi iĝis komunumo izolita de la mondo ĝuste per sia lingvo. Tio estas la baza paradokso kiun la adeptoj ne scias kiel trakti.

7.2 Espero anstataŭ strategio

En la movadstrategia senco eventuale konsilindus malkupli la kampanjadon por Esperanto disde la komunumo mem[9]. La plej racia opcio estus estonte klare dispartigi la tri aspektojn de la triunuo *lingvo* / *movado* / *komunumo* kaj trakti ĉiun el ili aparte tiel ke oni evoluigu apartajn strukturojn kaj strategiojn por ĉiu el ili[10]. Tiamaniere ĉiu aspekto havus proprajn agadkampon kaj celojn kaj ĉio kune havus pli da espero por sukceso[11].

Krom la espero, kiu ja surflagas kaj ennomas, restas ankoraŭ granda spaco por seriozaj duboj. Ne necesas esti brila analizanto por suspekti ke grupo da pensiuloj kaj kelkaj studentoj iam povos plenumi la celon pri kiu ili ĵuris (eĉ ne ĉiuj el ili). La nuna movado konsistas el homoj kiuj havas nek socian influon nek energion por vere antaŭenigi la aferon. La rezultoj de tiu ĉi enketo ne lasas dubon pri tio. Se ni volos kreski al alia kvalito, ankaŭ la kongresoj devus evolui al io plia kaj io alia.

Ni finu per vortoj de Humphrey Tonkin (2006: 137-138) mem:

---

[5] Ĉi-artikole mi referencas al la Manifesto de Raŭmo, ne zorgante pri la risko ke oni tial eble vidu min kiel apoganton de klubo al kiu mi ne apartenas kaj kies bazan filozofion mi ne akceptas, la t.n. Civito. Ties interpreton de la Manifesto mi trovas tro simpla, nekohera kaj unuflanka. Sed la resto de la movado kvazaŭ lasis la Manifeston al la ekskluziva posedo de tiu grupo. La Manifesto de Raŭmo ja meritas reakiri sian "normalan" lokon en la historio de la Esperanto-movado. La nomo de la finna urbo intertempe fariĝis simbolo por difinita orientiĝo en Esperantujo – sociologia fakto kiun oni ne povas ignori.

[6] Raŭmistoj ja klare konfesas la malsukceson kiel estiĝ-fonton de ilia interpreto: "Ankoraŭ ne plenumiĝis sociologiaj kondiĉoj por ke esperanto plenumu sian rolon de internacia lingvo, *dum aliaj esperoj ne ekzistas* [substrekis N.R]. Restas ĝui tiun esperanton kiu ekzistas kiel kultura fenomeno." Laŭ Żelazny (1998: 65) la movado havas la funkcion de "biologia konservanto" kies celo estas certigi la ekziston de Esperanto kiel civilizacia valoro.

[7] France: "ekzistokialo".

[8] Vd. Galor 1999.

[9] Tiu konstanta kaj strategie planata kampanjado inkluzivus informadon, varbadon, lobiadon, politikan agadon de supre kaj malsupre kaj ĝi ne devus lasi sin esti bremsata de la influoj de la komunumo mem. Bonan ekzemplon ni vidas en diversaj mediprotektaj movadoj: Ili ankoraŭ ne vere plene venkis, sed oni ja sentas ke kreskis ilia influo en la mondo. Ilia afero fariĝis la afero de ĉiuj civitanoj kaj ne nur de naturamikaj kluboj. Simile pri la lingvo prefere okupiĝu verkistoj kaj lingvistoj, pri kampanjado kaj lobiado okupiĝu kompententuloj. Tia profilo de metiistoj surprize mankas en la esence propagandisma kaj revoluciema movado: la laboron plenumas nur bonvolaj amatoroj.

[10] En tiu strategia plano al la aspekto lingvo apartenus la strukturoj kaj planoj por evoluigo de lingvopolitiko kaj al la movado tiam apartenus strategioj de lobiado, varbado, informado kaj apliko ĝis – kial ne? – la finvenkigo. Al la komunumo restus la aspekto kulturo en la plej vasta senco de la vorto: de literaturo ĝis spertado de la interna ideo en tipe kongresa etoso. Ĝi cetere ankaŭ devas funkcii kiel loĝistika subteno por la aliaj du aspektoj.

[11] El la tri aspektoj la aspekto *movado* estas la plej dubsenca. La movado fakte kaj praktike identiĝis kun la komunumo, spontanee kaj preskaŭ nerimarkite: temis iusence pri natura evoluo en kiu la mova aspekto dumtempe pli kaj pli paliĝis.

> […] la formado de aparta parolantaro kun propraj normoj ne nur lingvaj sed ankaŭ kondutaj *neeviteble kompromitas la universalecon de nia universala lingvo*, kaj riskas, ke ni fariĝu nur unu lingvokomunumo inter multaj, sed sen tiu sento de solidareco inter ni, ni ne povas plene vivigi nian lingvon kaj fari ĝin socia identigilo. […] *Esperanto celas neŭtraligi la potencorilatojn inter la lingvoj, sed celas tion fari sen propra potenca bazo*. […] se ni ne kreas komunumon, en kiu Esperanto estas plene uzata, ni ne havos firman socion, al kiu inviti pliajn adeptojn, sed kreon de tiu komunumo neeviteble akompanas *la konstruado de lingvaj kaj sociaj bariloj ĉirkaŭ nia socio.* [Kursivigoj miaj]

Jen do kelkaj simptomoj kaj jen kelkaj diagnozoj. Nun devus sekvi la terapia plano.

Bibliografio

Drakula, Danijela (2003): *Primjena teorije razložite akcije u predikciji zalaganja za esperanto*. Odsjek za psihologiju, Filozofski fakultet Sveučilišta u Zagrebu. http://darhiv.ffzg.hr/31.

Forster, Peter G. (1982): *The Esperanto Movement*. The Hague, Paris, New York: Mouton.

Galor, Zbigniew (1999): "Esperanto-movado: ĉu perdita komunumo?" http://www.lingviko.net/db/34_Galor.htm.

Rašić, Nikola (1994): *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.

— (1996): "Esperanto kaj familio – hobio aŭ vivstilo?" En: Stanislav Košecký (red.), *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo. Aktoj de la seminario okazinta 01-02.08.1996*. Bratislavo: Esprima, p. 107-115.

Sikosek, Ziko Marcus (2003): *Esperanto sen mitoj*. Dua prilaborita eldono. Antwerpen: FEL.

Tanquist, Reuben Algot (1927): *A Study of the Social Psychology of the Diffusion of Esperanto with Special Reference to the English Speaking Peoples*. Magistriĝa disertacio. University of Minnesota, Minneapolis.

— (1927/28): "Social Interest in Esperanto". En: *Sociology and Social Research*, vol. 12, July-August 1928, p. 554-560.

Tonkin, Humphrey (2006): *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.

Żelazny, Walter (1998): "Sociologio de la movado kaj la Internacia Lingvo". En: *Literatura Foiro* 29/172, p. 60-65.

Nikola Rašić

Nask. 1957. Finstudis sociologion kaj ĝeneralan lingvistikon en la Universitato de Zagreb; poste laboris tie. Verkis, plejparte en la kroata, precipe pri lingvaj kaj etnaj minoritatoj en pluretnaj landoj. Kunlaboranto de Kroata Enciklopedio; verkis pri la laboro de Dalibor Brozović, 2009. Lernis Esperanton en 1972, aktivis en la kroata movado. Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, 1988-2003. Plurfoje premiita en Belartaj Konkursoj (eseoj kaj poezio). Tradukis en Esperanton el la kroata, makedona, albana kaj slovena. Verkis pri sociologiaj esploroj en Esperantujo (*La Rondo Familia*, 1994). Ekde 2003 sendependa tradukisto, interpretisto kaj publicisto en Roterdamo.